

Johannes Daniel Falk,

Feliĉega vi

tradukita de Ferdinand Pfeil

Feliĉega vi, ĉarmoplena vi,
 Krista fest', beno por homar'!
 Mondo perdiĝis,
 Kristo naskiĝis.
 Ĝoju, ĝoju vi, ho kristanar'!

Feliĉega vi, ĉarmoplena vi,
 Krista fest', beno por homar'!
 Kristo nin ligis,
 nin senpekigis.
 Ĝoju, ĝoju vi, ho kristanar'!

Feliĉega vi, ĉarmoplena vi,
 Krista fest', beno por homar'!
 Kriston adoru,
 lin ni honoru!
 Ĝoju, ĝoju vi, ho kristanar'!

*Traduko de la Germana poemo "O du fröhliche" de JOHANNES DANIEL FALK (*1768 – †1826) en Esperanton de Ferdinand Pfeil.*

Arg-100-204 (2003-12-11 11:18:41)

Temas origine pri sicilia fiŝista kanto, kies melodion la germana doktulo Johann Gottfried Herder kunportis de sia Italio-vojaĝo en 1788. Kun la teksto de Johannes Daniel Falk (1768 - 1826), kiu estis privata scienculo en Vajmaro (Weimar), la kanto fariĝis unu el la plej popularaj kristnaskaj kantoj en Germanio. Tiu ĉi traduko troviĝas en la kantlibro "Mia kantararo I", kiun eldonis JOSEF SCHIFFER (Wilstorferstr. 58, D-78050 Villingen-Schwenningen, Germanio) en 2001.